

Christian Morgenstern,
Renkonto

tradukita de Willy Nüesch

Ni sidis ĉe du tabloj - lok' ? - en mond' ...
Trinkejo, urb', land', stel' - ne gravas ja!
Ni sidis ie en la vivoregno...
Ĉe tabla duo, tie ĉi kaj tie.

Kaj brulis mia kor': Knabino fremda,
se mi en ĉi okulojn versi rajtus -
se rekompencus min ĉi reĝa buŝo -
kaj se ĉi tiu reĝa man' min kronus - !

Kaj brulis via kor': Junulo fremda,
pro kio vi profunde min ekscitas -
ke mi genuojn viajn amus braki -
kaj diri sole: Kara, kara, kara - !

Kaj niaj koroj preskaŭ kunbatiĝis.
Sed ĉiu restis ĉe l' rigida tablo -
kaj fine ni nin levis kun l' aliaj -
eliris - kaj nin plu neniam vidis.

Traduko de la Germana poemo "Begegnung"
de CHRISTIAN MORGENSTERN (*Kristiano Ma-*
*tenstelo, *1871-05-06 - †1914-03-31*) en *Espe-*
ranton de WILLY NÜESCH (Ettelstr. 6, CH-
*8634 Hombrechtikon, Svislando, *1927-05-09).*

Arg-125-245 (2013-08-28 18:40:08)

La tradukinto Willy Nüesch (Ettelstr. 6, CH-
8634 Hombrechtikon, Svislando, telefono: +41-
(0)31-302 66 56) donis al mi, Manfred Retzlaff,
la permeson publikigi siajn poem-tradukojn en
mia interreta poem-kolekto „Argiope.bl0rg.net“.
Li ankaŭ kontrolis tiun ĉi elpresadon kaj mi
korektis tajperarojn laŭ liaj indikoj. Tiu ĉi lia
traduko aperis en la literatura revuo "Fonto"
n-ro 274 en Oktobro 2003.

Christian Morgenstern,
Begegnung

Wir saßen an zwei Tischen - wo? - im All ...
Was Schenke, Stadt, Land, Stern - was tut 's dazu!
Wir saßen irgendwo im Reich des Lebens ...
Wir saßen an zwei Tischen, hier und dort.

Und meine Seele brannte: Fremdes Mädchen,
wenn ich in deine Augen dichten dürfte -
wenn dieser königliche Mund mich lohnte -
und diese königliche Hand mich krönte -!

Und deine Seele brannte: Fremder Jüngling,
wer bist du, dass du mich so tief erregest -
dass ich die Knie dir umfassen möchte -
und sagen nichts als: Liebster, Liebster, Liebster -!

Und unsre Seelen schlugen fast zusammen.
Doch jeder blieb an seinem starren Tisch -
und stand zuletzt mit denen um ihn auf -
und ging hinaus - und sahn uns nimmermehr.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas CHRISTIAN
*MORGENSTERN (Kristiano Matenstelo, *1871-05-06 -*
†1914-03-31).

Arg-125-244 (2004-02-01 11:01:43)

Die von Herrn Willy Nüesch verfasste Übersetzung ist in
der internationalen Literaturzeitschrift "Fonto", Nr. 274
vom Oktober 2003, erschienen.